

## Seksa egaleco

Ĝenerale, malriĉaj landoj ankoraŭ valoras la kulturon doni altan konsideron al viro kompare al virinoj en la komunumo. Sed eĉ en riĉaj landoj, kelkaj civitanoj ankoraŭ ne akceptas ke iu virino estras iun komunumon, aŭ iun regionon aŭ la landon. La edukado pri seksa egaleco devas komenci hejme, tiel ke la ideo/valoro/kulturo alvenas al ĉiuj.

Senfina diskuto pri seksa egaleco engaĝis la gefratojn Mirana kaj Talenta iun vesperon, kiam ili atendis ke la vespermanĝaĵo estu kuirita/preta. Ambaŭ sinsekve klarigis kaj suportis iliajn ideojn per konkretaj ekzemploj. Aŭdante la diskuton, Randria, la patro, ne plu eltenis kaj helpis sian filon. Li silentigis sian filinon kaj ordonis ŝin akcepti, ke seksa egaleco restas revo en malriĉaj landoj kiel la nia.

- Mirana, ekde nun, kiam vi estas nur 16 jaraĝa, demetu de via menso tian ideon esti egalrajta kiel viro, por ke ne estu konflikto tiel, kiel okazas hejme inter mi kaj via patrino.

Mirana silentis ĉar pliaĝulo silentigas kaj donas moralon al ŝi.

- Kaj virino kiuj volas esti viroj ne estas parto de nia kulturo. Kondutu bone, fraŭlineto, diris avino, suportante la ideon de la viroj.

Mirana preskaŭ malfermis ŝian buŝon aŭdante, kion ŝia avino diris, sed fine decidis engluti sian ideon, ĉar ŝi konstatis ke stranga demokratio kiu ordonas devigan silenton de virino preskaŭ jam atingas lokon en ŝia hejmo.

Tia perforto, mensa perforto kiu subpremas multajn virinojn estas la kialo kiu instigis Ifara-n, la edzino de Randria eniri iun virinan asocion kiu luktas por la virinrajton. Ŝi ne informis sian edzon, ke ŝi estas ano de la asocio, ĉar ŝi jam konscias, ke li tute ne akceptos ian ideon pri egalrajto.

Preparante la manĝaĵon, Ifara aŭdis la varman diskutadon en sia hejmo. Do, ŝi decidis partopreni klarigante ideon, kiun ŝi lernis en la asocio, kaj apogante sian ideon per palpebla pliboniĝo, kiun ŝi sentas hejme aplikante la seksan egalecon.

- Jes, Patro, vi ĉiam malsamopinias kiam mi esprimas mian ideon. Mi elektis vivi seksan egalecon per miaj kondutoj kaj agoj, kiam vi malvalorigis mian ideon. Sed vi ne rimarkis tion. Se mi ne estus enirinta la asocion de virinoj, kiu luktas por la virina rajto, via pli juna fratino, kiu ofte estis batita per sia edzo, jam ne plu estus nun. Nia asocio sciigis al mi ke ni, virinoj, havas la samajn rajtojn kiel viroj, kaj oni ne rajtas senvalorigi nin. Tial, mi portis la problemon al la homa rajto asocio, kiu poste helpis ŝin.

Nun la vivo malfaciliĝas kaj se mi ne multe laborus, helpante vin pri nia vivteno, malriĉeco jam regus en nia hejmo. Tio jam estas unu aspekto de seksa egaleco. Do, ĝi jam plibonigis nian ekonomion, ĉu ne?

Ifara listigis aliajn palpeblajn pruvojn antaŭ la tri nekonvinkitaj familianoj kaj ili ne plu sciiis, kion diri. Seksa egaleco ne estas "virinoj kiuj volis esti viroj", kiel ili tri pensis, sed peto de rajto por ke ne estu particeco.

Laodoro de bruligita rizo en la kuirejo finigis la hastan diskuton inter la familianoj. Ifara foriris en la kuirejon por enmeti la rizon sur la telerojn. Mirana finfine elparolis la ideon, kiun ŝi antaŭe englutis, ĉar ŝi sentas, ke ŝia frato, ŝia patro kaj ŝia avino jam komencas esti konvinkitaj.

- Frato! "Kial vi lavas la telerojn kaj la vestaĵojn..., tiuj estas konsiderataj kiel virinaj taskoj?" demandis Mirana al Talenta, sia frato.

Ŝia frato ne sciis, kiel respondi al la demando kaj diskrete prenis sian telefonon. Li skribis "seksa egaleco" en guglo.

- Ĉu vi povas klarigi kial, filiĉjo? Demandis avinjo.

- Avino, kondiĉe ke io ne estas pli ol la virina korpo eblas fari, virinoj povas fari ĉion, kion viroj povas fari.

- Ĉu tio signifas ke nur fizika aspekto malsamigas viron kaj virinon sed tio, kion ili povas fari, estas la sama? Demandis Randria, kiu komencis esti konvinkita.

Mirana diris, ke estas insulto al virino klasifiki ilin, kiel malfortan ilon. Iam, ŝi estros iun asocion, kiu promocias kaj sciigas la valoron de seksa egaleco, kaj ŝia frato estos ŝia dekstra mano.

Verkita de RANDRIAMIALY Vona

Tradukita de RAFANOMEZANTSOA Falimanana